La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-10 n-ro 381

# Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Homaj Rajtoj 2017



Delegitoj el kvin membroŝtatoj de EU oponas usonan decidon pri statuso de Jerusalemo

Bangladeŝo: Amnestio Internacia : Kial la samseksemuloj forlasas Bangladeŝon?

Laŭ vilaĝanoj, fumo el fabriko de Viagro favoras erektiĝemon

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Bangladeŝo: *Amnestio Internacia* : Kial la samseksemuloj forlasas Bangladeŝon?
*Esti samseksemulo en Bangladeŝo estas danĝere p. 03*

Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Homaj Rajtoj 2017
*Graveco de lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco p. 04*

Delegitoj el kvin membroŝtatoj de EU oponas usonan decidon pri statuso de Jerusalemo
*Britio, Francio, Italio, Svedio kaj Germanio p. 04*

Komunumaj konfliktoj mortigis 45 homojn en Sud-Sudano
*Kaj 31 aliaj vunditaj p. 05*

Laŭ vilaĝanoj, fumo el fabriko de Viagro favoras erektiĝemon
Ĉe sudokcidenta marbordo de Irlando p. 05

Senkondiĉa, sed je ŝparnivelo
Finna sociala asekuro p. 06

Hodiaŭe
Emily Dickinson; Nelly Sachs; kaj Boato p. 07

# Bangladeŝo: *Amnestio Internacia* : Kial la samseksemuloj forlasas Bangladeŝon?

La Glata komunumo plu estas traŭmatizata pro la murdo de la iniciatinto de la magazino *Roopbaan*, kaj de lia amiko, en aprilo 2016, en Dako. Jaron pli frue, la bangladeŝa verkisto de libro pri samseksemo estis murdita.




Esti samseksemulo en Bangladeŝo estas danĝere. En majo 2017, la ĵurnalo *New Age* informis, ke tridek «junaj suspektatoj» estis arestitaj en asociejo de la ĉefurbo, Dako. Intervenis la rapidagadbataliono, elita taĉmento specialigita en la lukto kontraŭ krimo kaj terorismo. Aĝaj 18 ĝis 30 jarojn, la junulo «konsumis drogon, kaj post pridemando, ili konfesis sian samseksemon», deklaris la oficiro, kiu kondukis la operacon. La personoj arestitaj estis kondamnitaj nur pro konsumo de drogo, «ĉar ili ne samseksemumis», kiam la taĉmento alvenis, precizigis *New Age*, memorigante, ke samseksemo estas malpermesata kaŭze de leĝo, datiĝanta de la Imperio de la Britaj Hindoj.

La Glata komunumo fakte estas instigita fuĝi la landon, de post kiam paro de viroj estis murdita en sia hejmo, en aprilo 2016, en Dako. Tiu dramo estis detale rakontita la 10-an de oktobro 2017, en la usona retpaĝo *The Daily Beast*, fare de amiko de la viktimoj, kiu ĉeestis la eventon. Islamistoj proksimaj de *Al-Kaida* deklaris sin respondecaj pri la faritaĵo. «Ili estis ses, batis Kulhaz Manan ĝismorte, kaj ankaŭ lian amikon, Mahbub Rabbi Tonoj. Kulhaz Manan estas la iniciatinto de *Roopbaan*, la sola Glat-magazino en Bangladeŝo», raportas Ali Asgar, kiu foriris por vivi en Usono, kie li petis azilon. Li nun prizorgas la retportalon *Artists at Risk Connection* (ARC), ilo «kiu federas pli ol 500 organizaĵojn, kiuj helpas la artistojn, viktimojn de subpremo, persekuto, arestado kaj perforto pro ilia krea laboro».

**«Kapitulaco fronte al la islamaj ekstremistoj»**

Laŭ Ŝakhauat Hosajn Rajib, membro de *Boys of Bangladesh*, la plej malnova geja asocio de la lando, la nuna persekutado estas «ia kapitulaco fronte la islamaj ekstremistoj». En libera artikolo publikigita de la barata informa retpaĝo *Scroll*, tiu aktivulo rimarkigas, ke post la arestadoj de majo 2017, la famaj rapidagadbatalionoj urĝe publikigis en sociaj retoj la portretojn de la supozataj samseksemuloj, «cele urĝigi ilian proceson, elrevigitaj ke ili ne surprizis ilin dum orgio».

Kaj li sin demandas: «kial la policistoj kaj la profesiaj amaskomunikiloj tiel kompromitis la sekurecon de tiuj junuloj?» La respondo estas trovebla flanke de «la intensigo de religia fundamentismo, en etoso de kreskanta politika tiranio», pro kio Kib Avijit Roj, verkisto de la libro pri samseksemo, redaktita en bangladeŝa [bengala] lingvo, estis murdita en 2015, memorigas Ŝakhauat Hosajn Rajib.

Pasintjare, la bangladeŝa ĵurnalo *The Independent* publikigis alvokon, lanĉitan de la usona NRO *Human Rights Watch* por «ĉesigi la arbitrajn kaj amasajn arestadojn». En junio 2016, la policistoj efektive arestis 11 000 personojn, el kiuj multajn membrojn de la opozicio al la nuna registaro kaj kelkajn blogistojn laikajn aŭ ateismajn, uzante la pretekston de murdoj de samseksemuloj.

Neniam Milito Inter Ni

# Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Tago de Homaj Rajtoj 2017



Okaze de la Tago de Homaj Rajtoj, la **10-a de decembro 2017**, Universala Esperanto-Asocio ree asertas la fundamentan gravecon de la principoj esprimitaj en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj precipe rilate al socia justeco kaj daŭripova evoluigo tutmonde.

Fondita en 1908, UEA – la ĉefa monda asocio por la uzado kaj disvastigo de la internacia lingvo Esperanto – dekomence laboris por la ideoj de homa egaleco kaj tutmonda interkompreniĝo. Kvardek jarojn poste, jam antaŭ la akcepto de la Deklaracio fare de Unuiĝintaj Nacioj, la Asocio enskribis respekton al la homaj rajtoj en sia Statuto kiel bazan kondiĉon por sia agado. Nuntempe ĝi aktivas por dissemi informojn pri homaj rajtoj en pli ol 120 landoj.

La jaro 2017 estas la centa jaro post la forpaso de D-ro Ludokviko ZAMENHOF, la iniciatinto de Esperanto, kiu dediĉis sian vivon al la interfratiĝo de la homaro. Hodiaŭ UEA substrekas la kongruon inter liaj klopodoj kaj la streboj por plene universaligi la homajn rajtojn. ZAMENHOF volis atingi mondon, en kiu "homo renkontiĝas kun homo" en rilatoj de plena reciproka respekto. Tio restas la fundamenta celo de UEA. La Asocio invitas ĉiujn defendantojn de la homaj rajtoj konsciiĝi pri la graveco de lingvaj rajtoj kaj lingva egaleco en la laboro por atingi pli justan kaj pacan mondon.

# Delegitoj el kvin membroŝtatoj de EU oponas usonan decidon pri statuso de Jerusalemo



Konstantaj reprezentantoj de Britio, Francio, Italio, Svedio kaj Germanio al UN publikigis komunan deklaracion, oponante la decidon de Usono, kiu agnoskas Jerusalemon kiel ĉefurbon de Israelo.

La komuna deklaracio estis publikigita, post kiam la Sekureca Konsilio de UN okazigis urĝan kunvenon pri la demando de Jerusalemo. Ĝi diris, ke la kvin landoj oponas la usonan agnoskon de Jerusalemo kiel ĉefurbo de Israelo kaj la intencon transloki la usonan ambasadorejon el Tel-Avivo al Jerusalemo. Ili opinias, ke la decido ne konformas al la spirito de la rezolucio de la Sekureca Konsilio nek utilas al paco de la regiono.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## Komunumaj konfliktoj mortigis 45 homojn en Sud-Sudano

Sud-sudana oficialulo diris vendrede [08 dec 2017], ke almenaŭ 45 homoj estis mortigitaj kaj 31 aliaj vunditaj en lastatempaj konfliktoj inter rivalaj klanoj de la tribo *Dinka* en la centra regiono.



Shadrack Bol MACHOK, ministro pri informado de la ŝtato Okcidentaj Lagoj, diris al la novaĵ-agentejo *Xinhua* [ 新华社 xīnhuáshè], ke 45 homoj estis mortigitaj kaj 31 aliaj vunditaj post intensa batalo ekde merkredo inter la klanoj *Rup* kaj *Pakam* en *Nap* troviĝanta 80 kilometrojn for de la ŝtata ĉefurbo *Rumbek*.

MACHOK diris al *Xinhua* per telefono, ke la intensa batalo okazis merkrede je ĉirkaŭ la 8-a horo posttagmeze en *Nap*, kiam la klano *Rup* atakis la komunumon *Pakam*, mortigante multajn homojn kaj vundante plurajn.

Yu
Ĉina Radio Internacia

## Laŭ vilaĝanoj, fumo el fabriko de Viagro favoras erektiĝemon

De dudek jaroj la vilaĝeto *Ringaskiddy* – ĉe sudokcidenta marbordo de Irlando – gastigas la fabrikon de piloloj de sildenafilo-citrato, kiuj estas pli konataj sub la nomo “Viagro”, kaj laŭ ĝiaj loĝantoj speciala etoso ĉirkaŭvolvas la fabrikon de la apoteka firmao “*Pfizer*”, kies fumo supoze havas la kapablon kaŭzi erektiĝojn.



Al la gazeto “*The Times*” la loĝantaro asertas, ke ili longjare estas trafataj de la tiel nomata “amfumo”, kaj laŭ Debbie O’GRADY tio estas alloganta novajn loĝantojn al la vilaĝo.

Tiu urbeto estas konata pro ĝia “nekredebla seksema vivo”. SADIE, 60-jaraĝa frizisto, sin deklaras kiel flirtema virino, kaj ŝi diras neniam restis sola tie. Laŭ Fiona TOOMEY (37-jaraĝa), tie eĉ la hundoj vagadas per stato de seksa ekscito, sed ŝi kredas, ke anstataŭ fumo la kialo estas la akvo trinkata en la vilaĝo.

La proparolanto de la firmao klarigis, ke la kredo pri “viagro estas en aero” vere temas nur pri amuziga klaĉo, eĉ se la loĝantoj kontraŭas al lia aserto.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Senkondiĉa, sed je ŝparnivelo

Antaŭ 100 jaroj Finnlando atingis sian sendependecon. Jen juna lando kiu ŝatas eksperimenti - ekde januaro pri senkondiĉa baza vivenspezo. Unua resumo montras ke tio ebligas al la ricevantoj personajn ŝancojn. La ŝtato tiel povos ankaŭ ŝpari monon.



Por multaj senlaboraj finnoj estis letero kiu ŝanĝis ilian vivon. Komence de ĉi tiu jaro 2 000 senlaboraj finnoj ricevis mesaĝon de la finna sociala asekuro *Kela*. Ili estis lotumitaj por esti testpersonoj por aparta eksperimento.

Por la venontaj du jaroj ili ricevas anstataŭ la senlaboreca pago senkondiĉan bazan vivenspezon de 560 eŭroj monate. Por multaj lotumitoj tio estis apenaŭ kredebla surprizo kaj ili telefone alvokis ĉe *Kela* por certiĝi ke la baza vivenspezo estos elpagata vere senkondiĉe.

Nome senlaboruloj en Finnlando devas kontakti la oficejon de *Kela* ĉiam post kvar semajnoj. Ĉiu kroma enspezo devas esti anoncata kaj la senlaboreca pago tiam reduktiĝos laŭ tio. La nuna finna sociala sistemo ofertas malmultajn instigojn akcepti laboron, ĝi eĉ prezentas al senlaboruloj kaptilojn: Se senlaborulo akceptas partatempan laboron, la senlaboreca pago reduktiĝas tiom ke la koncernaj personoj sume disponas pri malpli da mono ol antaŭe.


Same en tia situacio ne klaras kiom da mono la koncernaj personoj ricevas kaj kiam ĝi estos ĝirata. Ĉar laborokupoj signifas ke la elpagaĵo estis rekalkulita kaj ke la elpago en plej multaj kazoj estis prokrastita. Pro tio nur tre malmultaj senlaboruloj akceptis etan laborokupon aŭ partatempan. La senkondiĉa vivenspezo nun ofertas al la testpersonoj financan sekurecon, ĉar ĝi estas ĝirata ĉiam komence de la monato kaj ne submetiĝas al impostado kiel la ĝisnuna minimuma senlaboreca pago. Kaj ĉiu perlaborita eŭro plialtigas la vivenspezon.

La finna registaro nun volas eltrovi ĉu la baza vivenspezo kreas pli da instigoj akcepti laborokupon. Sed tio ne estas la sola celo de la eksperimento. Estas ankaŭ celo redukti burokration kaj simpligi la socialan sistemon. Nuntempe en Finnlando ekzistas 43 diversaj socialaj pagoj kiuj ĉiuj havas sian propran kalkulbazon. La sistemo estas tre kompleksa kaj estas urĝe harmoniigenda.

Fine de la jaro 2018 la ekperimento estos science prijuĝata. Jam nun ekzistas la konsento de la registaro ke oni reformos la finnan socialan sistemon laŭ konsidero de la rezultoj. Apud novaj instigoj akcepti laborokupon, la finna registaro ankaŭ interesiĝas pri la efikoj al la stresosento kaj al la sanstato de la testpersonoj.

560 eŭroj en Finnlando ja ne estas multe da mono, sed tio estas ankaŭ la averaĝa senlaboreca pago. Kelkaj senlaboruloj ja ricevis pli sed ili devis indiki por ĉiu tago ĉu ili plenumas kromajn laborojn kaj kiom ili per tio perlaboras. Tiu perlaborita sumo tiam estis deduktita de la senlaboreca pago. La granda avantaĝo de la baza vivenspezo estas ke ĝi estas akurate ĝirata kaj sen kondiĉoj. Tio ebligas ŝancojn. Pluraj testpersonoj jam memstariĝis kaj fondis propran entreprenon. La baza vivenspezo donis al ili la kuraĝon realigi ideojn kiuj jam delonge estis en iliaj kapoj.

Esperanta Retradio



## Emily Dickinson

**Emily Elizabeth Dickinson (10-a de decembro 1830 - 15-a de majo 1886) estis usona poeziisto. Kvankam ŝi ne estis multe konata dum sia vivo, Dickinson iĝis apud Walt Whitman unu el la du plej gravaj poeziistoj de la usona literaturo de la 19-a jarcento.**

**Vikipedio**

## Nelly Sachs



**La verkistino kaj tradukistino Nelly Sachs [neli zaks] (origine: Leonie Sachs), naskiĝis la 10-an de decembro 1891 en Berlino. En 1966 ŝi gajnis la Premion Nobel de Literaturo.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

**Boato en *Hinnøya*, Norvedio.**

**Vikipedio**